


# Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

**JARABONO :**

Simpla : 10 fkoj
Bonfara : 15 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MAJO - JUNIO

1973 3

# KULTURAJ KAJEROJ

1973 — MAJO - JUNIO

Dumonata informada kaj kultura revuo

**REDAKCIA KOMITATO :**

**Sekretario :**

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

**Komitatanoj :**

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| **El Grésillon** | |
| **Esperanto tra la mondo** | A. Frangeul |
| **La ponto de Avignon** | S. Humm |
| **Maraj algoj** | |
| **Nikolao Kopernik** | D. Babin |
| **La lingvo-problemo en Belgujo** | F. Roose |
| **La unua Miss-Taksio** | |
| **Solvoj de antaŭaj konkursoj** | P. Chevalier |

**KULTURAJ KAJEROJ**
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

**KULTURAJ KAJEROJ**
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
respondos al gramatikaj demandoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

RAYMOND SCHWARTZ

Raymond Schwartz forpasis la 14-an de Majo. Ĉiuj esperantistoj en la mondo konis la esperanto-verkiston, humoriston kaj poeton. Kiuj ne ĝuis la legadon de « La Ĝoja Podio », « Kiel akvo de l'rivero », por mencii nur du el pluraj verkoj, kiuj restos tra la jaroj, kiel modeloj de tre alloga literaturo kaj perfekta lingvo ? Kiuj havis la bonŝancon viziti la parizan esperanto-kabareton, tiuj ĉiam memoros pri la spriteco de R. Schwartz. Ne nur al lia familio, sed al la tuta esperantistaro ni prezentas korajn kondolencojn.

# El Grésillon

Kun la suno venis la zorgoj pri la venonta somero. Jam kapdolorigaj problemoj prezentiĝis por loĝigi ĉiujn aliĝantojn laŭ siaj deziroj, ĉefe en julio, ĉar por aŭgusto ankoraŭ restas kelkaj ĉambroj. Do, ne prokrastu vian aliĝon.

Kio nova pri la prelegsalono ? Falis granda muro, kiu apartigis du ĉambrojn. Sed, surprizo, la du plafonoj ne estis samnivelaj ! Plia laboro estis necesa, plia tempo forrabita. Do, komence de julio estos vizitebla la loko, ĉiu povos vidi la dimensiojn kaj imagi surloke la planitajn instalaĵojn, ne pli. La preparado de la salono jam forprenis preskaŭ la tutan sumon disponigitan al ni de la Kultura Asocio, kiu kolektis la tiel malavare senditajn mondonacojn. La internajn aranĝojn ni esperas fari antaŭ julio 1974, dank'al novaj donacoj, kiuj komencas jam alveni. Tiuj internaj aranĝoj konsistos el la tegado de la muroj kaj de la plafono per nebruligebla, bruimuna materialo ; el la konstruado de projekci-ĉambreto, de nova elektra cirkvito... La sidiloj aĉetotaj estos komfortaj kaj moveblaj tiamaniere ke oni povos loki ilin aŭ meze de la salono aŭ ĉirkaŭ ĝi okaze de dancvespero. Okazos tie prelegoj, prezentadoj de filmoj, fakte ĉiuj komunaj aranĝoj, kiam la nombro da partoprenantoj estos tro granda por la salono de la kastelo aŭ kiam estos pli taŭge lasi la disponon de tiu salono al tiuj, kiuj ne interesiĝos pri iu programero.

Kaj poste ? Post la konstruo de tiu prelegsalono ĉu ĉio estos finita ? Ne. Feliĉe, ne ! Ĉar ni devos aranĝi kursoĉambrojn pli taŭgajn ol la nunaj, se eble kun lingvo-laboratorio. Kial ne ? Gresillon estu ne nur loko, kie renkontiĝas gesamideanoj el la tuta mondo, ne nur loko, kie oni la unuan fojon praktikas la lingvon sed ankaŭ la aktiva centro de formado de la estontaj instruistoj de esperanto, de tiuj, kiuj, en Francio kaj eĉ en la tuta mondo instruos la internacian lingvon en lernejoj. Estas dezirinde, ke en kelkaj lokoj la instruantoj kaj la instruontoj lernu la uzadon de la modernaj instrumetodoj ? Ŝajnas, ke Gresillon estas taŭga loko por tiu celo.

## NOTO

Kelkaj legantoj, skribante al ni, substrekis la intereson kiun vekis en ili la artikolo « Tra la mondo per biciklo » aperinta en la n° 1 - 1973 de Kulturaj Kajeroj kun la subskribo « Ekstraktoj de la verko de Alfa Beta ».

Ni nepre volas precizigi ke tiu artikolo estas nur tre malgranda parto de multe pli ampleksa teksto de la aŭtoro, kaj ke ni havis grandajn malfacilaĵojn por fari la elekton de tiu ekstrakto, tiom interesa kaj diversa estas la tuta verko.

Fakte ni tute konscias ke tiu ekstrakto ne donas veran ideon de la verko de Alfa Beta, kaj ni tre volonte plusendus al la aŭtoro la demandojn de la legantoj kiuj dezirus koni la tutan tekston.

# Esperanto tra la Mondo ★

## POST BEOGRADO : PRIMOŜTEN

Internacia Kultura Servo (Amruseva 5, YU-41000 Zagreb) anoncis organizon de 7-taga kultura feriado en la Esperanto-kampadejo de Primoŝten, de la 6a ĝis la 13a de Aŭgusto.

## JAPANAJ-ĈINAJ KONTAKTOJ

Lasttempe japana kultura delegacio vizitis Ĉinion. Inter la delegitoj, estis du esperantistoj, G-roj Toki kaj Tokuda. Esperanto-parolantaj ĉinaj funkciuloj estis oficiale asignitaj al ili.

S-ro Tokuda kaj S-ro Hujucz, prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo interkonsentis pri pluraj punktoj de reciprokaj interŝanĝoj de esperantistaj misioj, inkluzive de tiu de « Popola Ĉinio » al Japanujo okaze de la 60a japana esperanto-kongreso en Kameoka (12-13a de Aŭgusto).

Okazigo de Pacifika Kongreso de esperantistoj povus esti diskutata dum tiu kongreso.

## EN UNIVERSITATOJ

En pli ol 30 universitatoj de 16 landoj ekzistas esperanto-katedroj aŭ lektoratoj.

En « Kontakto », la ĉiam interesa revuo internacia de la junaj esperantistoj, aperis intervjuo de Prof. Szerdahelyi kiu instruas la internacian lingvon en la sociscienca universitato Eötvös Lorand de Budapeŝto, kiel oficialan fakon kaj ŝtatekzamenan objekton, en la kadro de la katedro pri ĝenerala lingvistiko kaj fonetiko.

Se edukistoj deziras serioze korespondi kun Prof. Szerdahelyi pri tiu temo de Esperanto en la universitatoj, jen lia adreso : Prof. Szerdahelyi Szigetvari, u. 22 11 4, Budapeŝto 8, Hungario.

En kelkaj universitatoj de Federacia Respubliko Germana okazis lastatempe lingvolaboratoriaj kursoj surbaze de programita Esperanto-kurso. Normala instruado de Esperanto okazas per instrukomisiitoj en la universitatoj de Hamburgo kaj Sarlando.

## SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ ANKAŬ EN 1974

Post sukcesaj someraj universitataj kursoj en la universitato de Lieĝo (Belgujo) en 1972, dua sesio okazos ankaŭ en 1974, en la sama loko pri la temoj : socilingvistiko, biologio, kemio. Skribu al Someraj Universitataj Kursoj, Boîte Postale 9, B-4000 Liège, Belgujo.

La ekzisto de tiuj altnivelaj kursoj en Esperanto estas tiel grava por la progreso de nia lingvo ke ili meritas la subtenon de la tuta movado.

Ĉiuj franclingvaj esperantistoj estas atentigitaj pri la nova bonega libreto « L'Esperanto » de Prof. Janton ; kiu aperis kiel n° 1511 de la populara enciklopedia kolekto « Que sais-je ? » de « Presses Universitaires de France ».

Tiu verko, vendita ĉe ĉiuj librovendisto, ne nur devas esti posedata de ĉiu franclingva esperantisto sed krome, estas unuagrada informilo por sisteme donaci al profesoroj, edukistoj, intelektuloj.

Post « Je parle Esperanto » de S-ro Thierry en la kolekto « Marabout Flash » (n° 345), estas la dua libreto kiu aperas en populara konata serio vendita al la publiko.

Ni sciu uzi ilin bone en la koncernaj landoj !

## NE FORGESU « NORDA PRISMO »

Valora literaturo estas necesa por la antaŭenigo de Esperanto. Pro tio, nia sola literatura revuo « Norda Prismo » meritas subtenon de kiel eble plej multe da esperantistoj. La ĉefredaktoro estas S-ro W. Auld kaj la jarabono 12 nederlandaj gld.

## EN LERNEJOJ

— De pluraj jaroj oni instruas la internacian lingvon en proksimume 100 lernejoj de tuta Bulgario (ĉirkaŭ 2500 infanoj). Ŝtata diplomo rajtigas edukistojn instrui Esperanton. Kursoj kaj pedagogiaj seminarioj regule okazas por ili.

— Oni vaste sendis publikan leteron de S-ro Raif Markarian, lernejestro, pri la eduka valoro de Esperanto, en edukistaj medioj de Britujo.

— En Nov-Jorko, okazas kursoj de Esperanto en deko da lernejoj, kun la modernstila libreto de la eldonejo « Channing & Beto » : « A first Course in Esperanto » de William Auld.

## ORNITOLOGIA RENKONTO

La 2a ornitologia dusemajno okazos ĵus antaŭ la Universala Kongreso, de la 25a, ĝis la 28 a de Julio en Zagreb. La programo antaŭvidas ekskursojn al naturrezervujoj, al marbordo kaj al marĉoj. Informas : D-ro M. Lozovina, Miramarska 13 D, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

## SOMERA UNIVERSITATO EN HUNGARIO

Ĝi okazos en Guyla de la 8a ĝis la 14a de Julio kun alloga grupo de prelegistoj el diversaj landoj, pri diversaj fakoj. Distraj aranĝoj kaj ekskursoj ne estas forgesitaj. Adreso : Somera Esperanto-Universitato, TIT, 48-as, u. 11 H-5700, Guyla, Hungario.

## NOVAJ ELDONAĴOJ

— Disko « William Auld legas poezion ». Tekstfolio aldonita.

— « Ne plu ludo », de N. Barthelmess, konata gvidanto de S.A.T., 5 noveloj verkitaj antaŭ 1928, en 1940 kaj 1947.

— « Infanoj de malriĉuloj », novzelanda romano de John A. Lee ; tradukis B. Potts.

— S.A.T. reeldonis « Une humanité, une langue » franclingva propagandbroŝuro komplete renovigita, kaj « Nouveaux cours rationnel » jam konata. Ambaŭ libroj estas tre bele prezentitaj.

## ĈU REAKTIVOS LA STUDENTA ASOCIO S.T.E.L.O. ?

Por restarigo de Studenta Tutmonda Esperantista Ligo (S.T.E.L.O.), la esperantistaj studentoj interesitaj estas petataj rilati kun S.T.E.L.O, studenta esperantista klubo, ul. Kujaswsha 24, Sopot, Pollando.

# LA PONTO DE AVIGNON



Avignon kuŝas ĉe la bordo de la riverego « Rhône » (Rodano), kiu longe estis grava obstaklo por komunikado inter regionoj de la dekstra kaj maldekstra bordoj. Tial la ponto super Rodano — finita en 1188 — ebligis rapidan kreskon de Avignon, ĉar ĝi estis la unua ponto super Rodano de la maro.

Tiu ponto, famkonata en la tuta mondo, pro la kanteto, havas sian propran historion.

La legendo rakontas, ke iu paŝtisto de la montaro nomata « Benezet » (t.e. eta Benedikto aŭ Benedikteto) aŭdis voĉojn, kiuj ordonis al li konstrui ponton super Rodano. Anĝelo kondukis lin ĝis Avignon kaj diris : « Tie, ci konstruos la ponton ». Kiam li komencis paroli pri sia projekto, li renkontis nur ridojn, mokojn kaj skeptikulojn, sed li fine sukcesis konvinki episkopon kaj popolon... levante kaj portante tre pezan ŝtonegon. La legendo estas bela, sed kiu ankoraŭ kredas je legendoj ?

Tamen « Sankta Benezet » ja ekzistis. Li estis monaĥo kaj sian tutan vivon li dediĉis sin al la konstruado de la ponto, kolektante monon por ĝi. Grupo de monaĥoj « Fratoj de la ponto » senĉese trakuris la regionon por kolekti necesan monon. Benezet baldaŭ mortis tute elĉerpita de la grandega tasko. Memore al li, la ponto nomiĝas « Ponto Sankta Benezet ». Pri la konstruintoj mem, oni nenion scias nek pri la teknikaj rimedoj uzataj por venki la ĉiam impetegan fluon de la riverego. La konstruado daŭris 11 jarojn : de 1177 ĝis 1188, kaj la ponto estis « la granda mirindaĵo » de tiu epoko. Ĝia 4-metra largeco estis sufiĉa por la tiama trafiko ; ĝi superstaris la riveregon je 8 metroj kaj konsistis el 22 arkaĵoj ; ĝi havis V-formon, kies pinto direktiĝis almonte. Je ĉiu ekstremo, oni konstruis fortikan pordegon. Sur la dua arkaĵo staris kapeleto sankta Nikolao, en kiu estis konservita la korpo de Sankta Benezet.



Sed tiu kompatinda ponto renkontis multajn malfeliĉojn :

Dum la religiaj militoj la franca reĝo Ludoviko la 8-a ordonis la detruon de la ponto por puni la loĝantojn de Avignon, kiuj subtenis Grafon de Tuluzo (1128). Oni rekonstruis ĝin, pli alta ol la unua, kun kvar kapeletoj ; sed tre ofte, inundoj de la riverego detruis ĝin. Dum pluraj jarcentoj « Fratoj de la Ponto » prizorgis la necesajn riparojn. Plie en la hospitalo de la ponto, oni akceptis la malsanulojn kaj ĉiajn malfeliĉulojn. La ponta fondaĵo estis vere bonfara institucio. Spite tion, naturo kaj politiko unuiĝis ofte por laŭvice detrui tiun kompatindan ponton.

Ponto de Avignon estis ankaŭ strategia punkto : fakte sur la dekstra bordo regis potenca franca reĝo, dum en Avignon sur la maldekstra bordo estis unue sendependa respubliko, poste teritorio de Papoj. Tial oni povas ankoraŭ vidi sur la dekstra bordo la imponajn konstruaĵojn de Villeneuve : turo de Filipo la Bela kaj fortikaĵo Sankta Andreo, kiuj ambaŭ kontrolis la papan registaron.



Kelkfoje Avignon akceptis glorajn gastojn, kaj ĉiam la ponto partoprenis la festojn ; honore al reĝo Karlo la 9-a, oni lumigis la tutan ponton per kandeloj. Por reĝo Ludoviko la 14-a oni kovris la ponton per velura tapiŝo... kiu ekscitis la reĝan ĵaluzon.

En 1580, 1674, 1680, la ponto estis detruita de la riverego kaj finfine forlasita de homoj...

Apud ĝi, oni konstruis novan, pli modernan ponton.

Kaj nun, oni ne plu pasas sur la ponto, nek kantas, nek dancas, nur la 14-an de julio ĉiujare, por la nacia festo.

Ĝiaj lastaj arkaĵoj restas nur por akcepti scivolemajn turistojn kaj revigi poetojn pri la pasinta tempo...

Tamen ponto de Avignon, kvankam ruinigita, restas famkonata tra la tuta mondo ... pro la kanteto ! Tiu kanzono ekaperis la unuan fojon en 1853 sur pariza scenejo, kie oni ludis opereton, kies historio disvolviĝis en Avignon. Ek de tiam la fama refreno forflugis en ĉiujn landojn, kie ĝi ankoraŭ nun trovas grandan sukceson.

S. HUMM.

# MARAJ ALGOJ

En la pratempoj estis sur gracilaj boatoj, ke la homoj sin riskis sur maro. Ili timis ĝiajn kolerojn, tamen tiuj tempestoj alportis al ili abundajn rikoltojn de maraj algoj : por iliaj kampoj estis riĉa grasigaĵo, por iliaj bestoj, nutra furaĝo ; por ili mem, la delikataj taloj ruĝaj kaj verdaj. Iom post iom la homoj malinteresiĝis pri la plantoj de la maro, kiun ili pli kaj pli polucias ; krom en kelkaj lando: precipe en Ekstrem-Oriento kaj Japanio por kiuj la jara rikolto superas 250 000 tunojn.

## Algoj en bredado kaj agrikulturo

Kutime ĉe marbordo bovoj paŝtas herbon kaj ovioj sin nutras sur salaj herbejoj. Sed en Norvegujo kaj Irlando servo-bestaro tondmanĝas la algojn dum malalta tajdo. Tiu praktikado estas tre malnova, tamen en Eŭropo ĝi datumas nur de la Unua Mondmilito, dum kiu la laminarioj servis por nutri ĉevalojn. La maraj algoj estas do paŝtitaj sur kampoj aŭ rikoltitaj de la farmistoj, kiuj ilin rudimente transformas en ian rekrementon aŭ farunon, kiun ili miksas, laŭ variaj proporcioj, al aliaj furaĝoj.

Ĉiujare diversaj landoj (Norvegujo, Irlando, Britujo, Danlando, Novzelando, Kanado, Francujo, Sud-Afriko, Ekstrem-Oriento) produktas proksimume 60 000 tunojn da algo-farunoj.

Algoj eniras en nutradon de bovoj, ovioj, ĉevaloj, porkoj, birdaro.

La apudmaraj loĝantoj uzas la algojn por plibonigi la teron de sia ĝardeno, miksante ilin kun torfo aŭ kun sablo ; iaj ruĝaj algoj plibonigas la grundojn malriĉajn je kalko ; ili igas la teron pli leĝera ; ili sorbas la humidecon kaj ĝin konservas. En Bretonio, ili permesas kulturadon de terpomoj, artiŝokoj, florbrasikoj. Kompare al sterko la algoj liveras saman kvanton de azoto sed malpli da fosforo, kaj pli da potaso ; sed ili entenas nek fredajn semojn, nek nocajn larvojn, kiel faras la sterko.

## Maralgoj en Industrio

De tre longtempe oni ekstraktas diversajn industriajn produktojn el la brunaj aŭ ruĝaj algoj. El la brunaj oni eltiras, per macerado « alginikan » acidon kaj « alginatojn » ; per kalcinado : sodon, potason, jodon (hodiaŭ eltirita el la ĉiliaj nitratoj). El la ruĝaj oni eltiras agaragaron, « karagenon » kaj en Japanio aliajn produktojn inter kiuj la « kunori » — on uzatan en fabrikado de kaheloj kaj cimentoj, ĉe kiuj ĝi rolas kiel malmoliganto kaj vernisanto.

## Algoj en homa nutrado

De ĉiam la apudmaraj loĝantoj enigas algojn en sian nutron. Ilin oni povas manĝi krudaj en salato. La malgrandaj specioj estas sekigitaj ; aliaj estas kuiritaj, akompane al supoj, rostaĵoj, saŭcoj kaj al diversaj galetoj, kiuj ĝenerale akompanas rizon. Estas precipe en Japanio, en la maraj provincoj de Ĉinio kaj sudorienta Azio, ke la algoj estas baza nutraĵo de la popoloj. Por la okcidentanoj kaj la insulanoj de Sud-Pacifiko ili estas nur kondimentoj ; la ruĝaj algoj estas foliigitaj, sekigitaj aŭ boligitaj por ekstrakti la gelozon, kiu servas al preparado de kremaĵoj, desertoj K.T.P. La manĝantoj plej ofte ne scias, ke estas algoj en sia telero.

En Japanio la algoj estas intense kulturitaj. Oni havigas al ili kiel eble plej grandan fiksado-surfacon : branĉaro, tigoj kaj lamenoj de bambuo, specialaj retoj servas kiel apogiloj por la reproduktaj ĉeloj (sporoj kaj gametoj). Oni ilin elakvigas, kiam la algoj estas adoltaj por faciligi la rikolton. Poste oni ilin denove mergas. 70 000 personoj plej atente zorgas tiun kulturadon. En Sudorienta Azio la hirundo-nestoj estas konstruitaj el ruĝaj algoj, kiujn sub formo de gelatena produkto, kiu malmoliĝas ĉe



aero kaj kiun ili demetas laŭ sinsekvaj tavoloj. la birdoj moligas en sia digesta tubo kaj regurgitas. Tiuj nestoj, tre rezistemaj, estas konstruitaj ŝirme de rokoj aŭ ĉe muroj de kavernoj aŭ en marbordaj grotoj. Geviroj ilin kolektas, kio ofte estas sporta heroaĵo. Poste, tiuj nestoj estas eksportitaj en okcidentajn landojn, kie ili enestos en la « fama » supo el hirundonestoj.

La nutra valoro de la algoj varias laŭ la specioj; la plej multo el ili enhavas precipe glucidojn, lipidojn kaj proteinojn; tamen ilia dietetika valoro konsistas el la oligoelementoj kaj la mineralaj saloj : mangano, bario, boro, kaj precipe jodo. Plue ili entenas vitaminojn (A.B.C.) kelkfoje en granda proporcio. Tial la algoj alportas riĉan elementon al popoloj, kiuj suferas je nesufiĉa nutrado.

Multaj fiŝoj manĝas la molajn ekstremaĵojn de la taloj; aliaj, en tropikaj regionoj, havas veran bekon por manĝi la kalkigitajn algojn de la koralaj rifoj. Krome multaj senvertebruloj inter kiuj moluskoj ekinodermoj, sin nutras je algoj aŭ planktono. Cetere tiu ĉi lasta same nutras larvojn de krustacoj aŭ moluskoj kaj balenojn.

La Diatomeoj havas ĉefan rolon en la « verdigo » de la ostroj. La vakuoloj de tiuj mikroskopaj algoj entenas ĉelan bluan sukon « la marenino ». En precizaj periodoj, tiuj diatomeoj multnaskiĝas en la specialaj basenoj de atlantika franca marbordo; la ostroj, kiuj sin nutras je tiuj algoj transformas tiun bluan sukon en verdan substancon, kiu fiksiĝas sur iliaj brankoj. Tiu « verdigo » estas konata de longa tempo, ĉar en la XVII-a jarcento oni vendis al Versajlo verdajn ostrojn.

## Algoj en Medicino

Kiel la teraj plantoj, ili proponas al ni terapeŭtikajn ecojn; raraj estas la toksaj algoj. Ilia empiria uzado de longe kuracas malsanojn : ili povas esti antivermilaj, antikoagulantaj, laksetigaj; ili efikas kontraŭ fojno-febro kaj diversaj perturboj : gastraj, renaj, dermologiaj; ili eniras en ŝvitigaj medikamentoj, en moligaj kataplasmoj; ili helpas tiroidan funkcion. En algo-banoj, la fresaj, algoj efikas kontraŭ reŭmatismoj, kontraŭ perturboj ĉe cirkulado kaj paŝado, aŭ tute simple kontraŭ diversaj trolaciĝoj. Antaŭ nelonge oni malkovris, ke kelkaj algoj entenas antibiotikajn substancojn, kiujn oni studas en laboratorioj.

La maraj algoj konstituas preskaŭ la tuton de la mara flaŭro. Ili estas Kriptogamoj, kiel Fungoj kaj Likenoj. Kiel ĉiuj vegetaloj ili havas kompletajn ĉelojn; tamen kelkaj estas tre simpla ĉelo, simila je bakterio. Tiuj organismoj nomitaj taloj ne similas la terajn plantojn : ili havas nek radikojn, nek foliojn, nek tigojn, nek florojn, nek grajnojn. Kontraŭe al Fungoj ili havas klorofilon ofte maskitan de la pigmentoj kiuj igas iin ruĝaj, brunaj aŭ bluaj.

Formo kaj grandeco tre diversiĝas; la grandaj Laminarioj povas atingi 50 metrojn dum la algoj de la Fitoplanktono atingas nur 2-3 mikronojn. Ili povas esti moviĝemaj, dank'al kinetiloj, precipe ĉe fitoplanktono kaj reproduktaj ĉeloj. Aliaj algoj estas fiksaj. La formoj varias : filamentoj pli malpli disbranĉigitaj, malgrandaj tufoj, arbofolioj, arbustetoj, etaj koniferoj. La algoj renkontiĝas en ĉiuj maroj. Tamen ili varias laŭ temperaturo, sunumado, grundo kaj movoj de la ondoj. Ili preferas rokajn marbordojn sur kiuj ili fiksiĝas per krampoj; en sabla tereno ili uzas rizomojn. La vivo-daŭro povas esti jara; sed la algoj povas esti staŭdoj.

La klorofilo bezonas lumon por fiksi la karbonan dioksidon; tial ili restas ĉe la supraĵo de la akvo ĝis proksimume 100 metroj. La travidebleco de la polinezia laguno plej favoras la grandajn algojn.

La Maro de la Sargasoj, kiun malkovris Kristoforo Kolombo okupas larĝan surfacon en golfo de Florido. Tie ĉi la sargasoj plej densiĝas; ili ŝirmas bestojn kaj larvojn tre multnombrajn. En somero la algoj reproduktiĝas kaj la fortaj uraganoj alportas el golfoj de Meksikio kaj Jamaiko novajn algojn.

La Fitoplanktono : ĉi tie la plej multo el la plantoj estas unuĉelaj. Ilia graveco en la ekonomio de la oceanaj medioj estas esenca. Fakte ili estas, ĉe transformado de la Materio, la unua ĉenero, kiu ligas la mineralan mondon al la vivanta mondo.

Reproduktado : La algoj plej interesas la biologojn. Dank'al elektronika mikroskopo oni povas pli profunde studi organismojn pri fotosintezo, ellaborado de ameo, pigmentoj, kinetiloj, reproduktado.

Estas meze de la lasta jarcento, ke S-ro Thuret eksperimentis en la mara akvo de Bretonio pri fekundigo inter ina kaj vira gametoj de algoj.

La reproduktado povas esti monogenetika : unu generacio sufiĉas por doni samajn individuojn, havantajn sekson.

Sed, plej ofte, du generacioj estas necesaj : la unua donas sporojn, kiuj ne havas sekson kaj ne taŭgas por reproduktado; ĉe la dua generacio la sporoj donas inajn kaj virajn gametojn, kiu povos reprodukti.

## La maraj algoj, konstruantoj de rokoj

La unuĉelaj diatomeoj, kun silica karapaco sedimentiĝis en la sekundara kaj terciara eraoj. Same ankaŭ grave rolis la plurĉelaj algoj. Ili entenis kalkon kaj formis niajn kalkajn montojn kaj basenojn (la Pariza Baseno). La geologiaj eventoj skuis la tuton. En U.S.A. la urbo Richemont (Virginio) kuŝas sur 9-metra tavolo de diatomeoj. En New Jersey (Atlantic City) la diatomeo-tavolo atingas 100 metrojn. En Pacifiko la alga kresto de la koralaj rifoj kaj atoloj formas veran muron kontraŭ la fortegaj atakoj de la enormaj ondoj de la granda oceano.

Nuntempe kvankam sedimentaj kaj pulvoriĝemaj, la silicaj skeletoj de la diatomeoj akumuliĝas sur la fundo de la maroj kaj formas dikan tavolon nomitan « Kaĉo el diatomeoj » aŭ « diatomito »; ĝin oni uzas industrie kiel erodilo, sorbilo, termika izolilo; ĝian porecon servis por fabriki dinamiton kun nitroglicerino.

La guano estas riĉa je diatomeoj; la birdoj, kiuj glutas planktonon ĝin forĵetas kun siaj ekskrementoj.

La aŭtomobilisto, kiu rulas dank'al benzino (do petrolo) certe ne pensas, ke antaŭ milionoj da jaroj la enormaj tavoloj de planktono transformiĝis, pere de neaerobiaj bakterioj, en tiun mineralan oleon.

La studoj pri evoluado de la plantoj alvenas al tiu konkludo : Antaŭ 250 milionoj da jaroj la algoj eliris el la maroj, invadis la teron sub formo de musko kaj likeno.

La evoluado de la vegetala regno estis komencita.

# Nikolao Kopernik

PTOLEMEO — ARISTARKO KAJ KOPERNIK




Ŝajnas ke, en la homa historio, okazas gravaj ŝanĝoj dum periodoj superigitaj de famaj nomoj.

Nia evoluo fluas kontinue, eventoj estas konsekvencoj de aliaj eventoj ; sed kelkaj aperas multe pli ampleksaj : la historiistoj ĉefe interesiĝas pri tiuj precizaj punktoj en la ĉiam samkurba spiralo de la historio : tiel naskiĝas historiaj turnopunktoj, kaj revolucioj, artaj, sciencaj aŭ aliaj !

Ĉi-jare, ni solenas Kopernik, kaj la « kopernikan Revolucion ». Sed estas plej bone paroli pri « presarta revolucio » : la diskonigo de la ideoj dum tiuj jarcentoj verŝajne plej gravis ol la ideoj-mem. Tamen, oni ne povas nei la influon de Kopernik por la moderna scienca esploro.

Nikolao Kopernik naskiĝis la 19an de Februaro 1473, en Torum (Pollando), dum Mezepoko, kaj li mortis, en 1543, jam en Renesanco. Li naskiĝis en burĝa familio, en glora kaj potenca Pollando. En 1483, kiam la patro mortas, Lukas Watzenrode, episkopo de Warmie, okupiĝas pri Nikolao kaj lia frato Andreo. Ili studas dum kvar jaroj en Krakovio, kie Nikolao vizitas matematikajn kursojn. Ŝajnas ke li studas la kanonajn regulojn. Poste, li sin registrigas en la Universitato de Bologna, specializigita en kanona juro.

Tie, en 1497, li atingas la gradon de Majstro pri Arto, kaj ricevas prebendon de kanoniko en la Katedralo de Frombork (Franenburg). En Bologna, li vizitas ankaŭ kursojn pri astronomio, kaj kursojn pri medicino. Universala menso de humanisto !

Kiam li revenas en Warmie, en 1503, li restas en la kortego de sia episkopa onklo kiel medicinisto kaj konsilanto. Sed Lukas Watzenrode ne interesiĝas pri la astronomiaj esploroj de Kopernik. En 1512, Kopernik loĝas definitive en Frombork. Sed nur en 1532 li povas trankvile daŭrigi siajn studojn.

Ĉar li devas unue defendi Frombork kontraŭ la atakoj de la Teŭtonaj Kavaliroj. En 1517, li redaktas « Meditojn » pri mona plibonigo necesigita pro la malordoj kaŭzitaj de la milito. Oni ĝenerale ne scias ke la unuaj « monistoj » estis astronomiistoj, verŝajne pro iliaj matematikaj scioj. Kopernik elskribas la bazojn de la teorio poste nomita « leĝo de Gresham » : malbona mono, kiu cirkulas kun bona ĉiam superiĝas ; oni preferas sanan monon, kaj tial oni ĝin ŝparas : restas do la malbona.

Finfine, en 1532, Kopernik povas daŭrigi sian laboron pri astronomio, kaj komencas verki sian « De Revolutionibus Orbium Coelestium ». Rheticus, juna adepto de astronomio, helpas Kopernik, kaj diskonigas lian laboron tra Eŭropo. Tiu nura disĉiplo efektivigas la « Kopernikan Revolucion », ĉar li konsentigas Kopernik pri la eldonado de « De Revolutionibus... ». Sed la eldonisto Jetreius, interkonsente kun la teologo Ossiander, redaktas antaŭparolon sen permeso de la aŭtoro : ili prezentas la teorion de Kopernik kiel simpla hipotezo, sen ia pretendo al fizika realeco, kiu ĉiam estos nekonebla. Tamen, la katolikoj ne tuj atakas tiun verkon, ĉar ili opinias ke ĝi estas nur akademia temo.

Kopernik mortos la 24an de Majo 1543. Oni rakontas ke, de sia mortlito, li vidis ekzempleron de sia libro.

Nun ni prezentu lian astronomian sistemon. Kiu estas lia startpunkto ? Certe ne tiu de nia antikva Ptolemeo, al kiu la polemisto Galilejo kontraŭigos Kopernik ; sed fasko de « novaj » ideoj, kiuj spruĉas en tiun jarcenton. Ni precizigu ke longdaŭre ekzistis baroj inter nia romana civilizacio kaj la araba kaj hispana mondoj kiuj daŭrigas la grekan tradicion. Nur ĉirkaŭ la XIIa jarcento, la hispanaj tradukistoj konigis al la nordaj monaĥoj la sciencon de Aristarko kaj Ptolemeo.

Aristarko de Samos (IIa jarcento antaŭ J.K.) situas la sunon je la centro de la mondo ; la planedoj rondiras laŭ regulaj orbitoj. Sed lia sistemo ne precizigas la varion de distancoj, do de la briloj, de la planedoj dum ilia movado.

Ptolemeo (IIa jarcento post J.K.) situas la teron je la centro de la mondo. Lia sistemo, tre kompleksa, necesigas kombinadon de multnombraj cirkloj, kaj la planedoj ne regule moviĝas sur sia orbito. Ptolemeo estas ĉefe matematikisto, kaj la precizeco de liaj astronomiaj tabuloj donis al tiu sistemo grandan sukceson.

Kopernik ne akceptas la Ptolemean sistemon, pro intuiciaj kaj estetikaj kaŭzoj, inter kiuj ni citu :

— la cirkla regula movo estas la plej perfekta kaj la plej natura por sferaj korpoj (Kopernik sekvas tie la doktrinon de Platono) ;

— la suno, la plej brila inter la astroj, devas esti metita en honorloko : la centro de la mondo.

Tamen Kopernik prenas la matematikan aspekton de la teorio de Ptolemeo. Lia sistemo ne multe diferencas de tiu de Aristarko, sed, la unuan fojon, suncentra sistemo estas matematike priskribita.

La tero ne plus situiĝas je la centro de la mondo, kaj ĝi moviĝas ! Precipe tiu lasta fakto liveras fortajn argumentojn al la kontraŭuloj. Ni devos atendi la laborojn de Galilejo kaj Kepler por kompreni kial ŝtono falas vertikale, kaj kial ĉiama ventego ne blovas, malgraŭ turniĝo de la tero.

Samtempe, la homoj konscias pri la amplekso de la mondo. Paskalo timiĝos pro la « eterna silento de tiuj senlimaj spacoj ». Oni komprenas la filozofian influon de Kopernik !

Sed mi opinias ke la precipa influo de Kopernik estas scienca. Kelkaj konsideras Kopernik kiel impetegan revoluciulon, aliaj kiel timeman monaĥon. Ni retrovas la du aspektojn de serĉulo : certeco kaj dubo ! Ni certe povas proklami Kopernik la unuan modernan sciencan serĉulon.

Dominique BABIN.

# La lingvo-problemo en Belgujo

Belgujo havas preskaŭ dek milionojn da enloĝantoj. Vivas en tiu ŝtato tri popolpartoj : 1) la Flandroj (preskaŭ 6 milionoj) ; 2) la Valonoj (preskaŭ kvar milionoj ; 3) ĉirkaŭ tricentmil Germanoj en la orienta parto de la ŝtato. La landlimo inter Belgujo kaj Nederlando trakuras tri regionojn de la Nederlanda popolo : Flandrujo, Brabanto kaj Limburgo.

*Historia retrorigardo.*

Dum la Mezepoko la regionoj kiuj formas nun la Belgan kaj Nederlandan ŝtatojn estis dividitaj en sendependaj grafolandoj kaj dukolandoj : ekz. la grafolandoj Flandrujo, Namuro, Zelando, Holando kaj la dukolandoj Brabanto, Luksemburgo k.a. Unuafoje tiuj landoj estis unuigitaj fare de la Burgundiaj dukoj dum la 15a jarcento, kaj la Habsburgano imperiestro Karlo la kvina en 1549 finfaris tion. Sed jam dum la regado de lia filo Filipo la dua, en la dua duono de la 16a jarcento okazis ribelado kiu kondukis al rea divido de la Nederlandoj, ne plu en apartaj grafo — kaj dukolandoj sed en du partoj, la Nordaj Nederlandoj kaj la Sudaj Nederlandoj. La limo inter tiuj du estis la okcidenta Skeldo, kaj la regionoj de la riveroj Waal, Rejno, Lek, Maas (= la Meuse). La Nordaj Nederlandoj iĝis sendependaj kaj konis gravegan prosperon. La Sudaj Nederlandoj neniam plu estis sendependaj, konis sinsekve okupadojn Hispanan, Aŭstrian, kaj Francan ; konis ankaŭ grandan mizeron, malriĉecon, multajn kaj longajn militojn. Tia stato, kiu daŭris jarcentojn, lasis spurojn. Ekzemple la malesto de nacia fiersento ĉe la Flandroj. Alia ekzemplo : la malplivalorkomplekso ĉe ili. Ankoraŭ alia ekzemplo : la emo malobei aŭ eviti la leĝon ; tion oni konsideras tre natura ; la malrespekto de la leĝo estas ofte laŭdata kaj eĉ rekompencata. Tamen du sociklasoj kapablis pli malpli adapti sin, la nobeluloj kaj la burĝoj. Tiu adaptiĝo manifestis sin en la akcepto de la lingvo de la okupantoj, kaj tiu lingvo estis la Franca. Kiam ekestis la ŝtato de la unuigitaj Nederlandoj en 1815 sub regado de Vilhelmo, la nobelularo kaj burĝoj estis komplete francigitaj. Tiu ŝtato vivis nur dum 15 jaroj. En 1830 okazis ribelado kaj la starigo de la Belga ŝtato. Je tiu momento la situacio estis do la jena : La Franca lingvo estis la lingvo de la pli bonaj, pli altaj klasoj kaj la Flandra lingvo estis tiu de la malaltaj klasoj. Tio devas komprenigi la fakton ke multaj Flandroj deziris ke iliaj infanoj leviĝus iamaniere al tiuj pli bonaj klasoj, ekzemple adoptante la Francan lingvon. Alia grava faktoro estis ke la Franca lingvo estis la sola kulturlingvo. La Flandra ja estiĝis nur ia senkultura dialekto. Tio devas komprenigi jenajn faktojn : 1) En la nova Belga konstitucio, kvankam libereco de lingvo estis proklamita, nur la Franca estis la oficiala lingvo por tuta Belgujo. 2) La malestimo de tiuj « pli bonaj klasoj » por tiu dialektaĉo ; la opinio ankoraŭ en la komenco de la 20a jarcento esprimita de la Belga episkoparo : ke la Flandra lingvo neniel taŭgas por estigi Flandralingvan universitaton. 3) Ke ankoraŭ nun multaj franclingvaj personoj (i.a. multaj Bruselanoj) pretendas ke ili havas en Belgujo la elekton inter kulturlingvo (= la Franca) kaj dialekto (= la Flandra). Ili ne scias aŭ ne volas scii ke tiu Flandra lingvo nun ne plu estas tiu dialektaĉo de antaŭ duona jarcento, sed iĝis ree la plenvalora tutnederlanda lingvo. Estas vere ke multaj Flandroj mem kulpas pri tiu situacio ĉar ili ne faras al si la penon paroli kulturitan lingvon.

*La renaskiĝo de Flandrujo kaj de la Flandraj lingvo kaj kulturo*

Oni certe povis timi ke tiu dialektaĉo de la malaltaj klasoj en Flandrujo iam, post ne longa estonteco, malaperus por ĉiam. La malo okazis. Kiel tio estis ebla ? La Romantismo faris tiom. En la komenco de la 19a jarcento estiĝis ĉie tiu amo al la glora pasinteco de la propra popolo. Oni ĉie ekadmiris la Mezepokon. La literaturo konis la historiajn romanojn. La arkitekturo imitis la gotikan stilon. Ĉe ni, multaj intelektuloj kaj artistoj, Francparolantaj, ekstudis la historion kaj la arton de Flandrujo dum la Mezepoko. Kaj efektive la Grafolando Flandrujo kaj Brabanto estis altnivelaj tiurilate. Baldaŭ grupo de tiuj intelektuloj « revis » revivigi tiun kulturon. Ekestis la « Flandra Movado », kiu komence estis nur kulturmovado. Baldaŭ tiu movado iĝis ankaŭ politika. Ja baldaŭ oni postulis ankaŭ « rajtojn » por tiu lingvo. Grandan skuon donis juĝeja skandalo. En 1860 du Flandraj laboristoj (Couche kaj Goethals) estis akuzitaj de murdo kaj ekzekutitaj en Charleroi. Kvankam oni povas dubi ĉu ili vere nenion komprenis dum la tuta proceso kiu okazis en Franca lingvo, restas la fakto ke ili ne konis tiun lingvon. Unu jaron poste oni malkovris la verajn kulpulojn ! Iom poste kelkaj Flandremuloj en la parlamento sukcesis akiri la unuajn leĝojn rilate la lingvojn, i.a. ke la juĝo devas okazi en Flandra lingvo se la akuzitoj estis Flandroj. Post tiuj leĝoj venis aliaj... ĝis nun. Ne

estas la intenco skribi tie-ĉi pri la historio de tiu Flandra movado.

*La nuna situacio kaj la nuna batalo.*

